Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Januaro 1992 maandblad 63-a jaro, n-ro 1 (1039)

** Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem **

LANTI - VEKIĜU !

"La patriotismo estas nuntempe la plej potenca ideologio: ĝi pasiege superregas la spiritojn kaj kapablas fari el pacemaj bonkoraj homoj batalemajn kaj sangavidajn bestojn" - ci skribis en 1930.

Cia Sennaciulo en oktobra numero frontpaĝe vokas kapitalistajn landojn al rekono de Kroatio kaj Slovenio por poste sendi internaciajn fortojn kontraŭ Serboj. Ĉu en venonta numero de nia gazeto oni legos la nomojn de SAT-anoj kiuj mortis pro partopreno al batalo de ĝisostaj naciistoj, ĉu Kroatoj, ĉu Serboj?

Centmiloj da infanoj naskiĝis el dekmiloj da serbkroataj paroj. Kien ili devas sin turni? Aliaj interetnaj paroj ankaŭ formiĝis.

Estas terure vidi Serbojn bombardi kroatajn urbojn, inkluzive artan urbon Dubrovnik kaj Kroatojn, eksplodigi sanitaran neŭtralan veturilon, kiu venis por havigi kuracilon al kroataj vunditoj.

La naciisma "deriviĝo" venenas Serbojn, Kroatojn kaj Slovenojn. La agresemo de la Serboj nun superas tiun de Kroatoj sed la ĉesigo de tiu stultega milito prefere estu atingita per la subteno al pacemaj fortoj. Ili ekzistas. En gazeto "le Monde" pluraj jugoslavoj bedaŭras tiun interfratan batalon. "Nia korespondanto" asertas, ke "dum jardekoj la federaciaj instancoj defendis la interesojn de la Serbio", sed, Aleksandro PETROVIĈ, filmisto de "Ekzistas feliĉaj ciganoj", rimarkigas ke TITO kaj KARDELJ, kiuj estris longtempe Jugoslavion pli volonte favoris SLOVENION, kie ili originis. (La patrino de TITO estis Slovenino, la patro Kroato). Li montras ke en Slovenio la enspezo po loĝanto superas tiun de Serbio. Ankaŭ en sama gazeto, slovena filozofo Stojan PELKO, bosnia komediisto, Vladimir VELIĈKOVIĈ, serba artpentristo, Nada STRANĈAR slovendevena aktorino, pledas por pluigo de Jugoslavio. Same, la 28-an de julio 100.000 personoj kunvenis en SARAJEVO por postuli pacon. Tiun kunvenegon iniciatis artistoj kaj intelektuloj de diversaj etnoj.

Tiuj agadoj ŝajnas pli subtenindaj kaj pli konformaj al SAT-tradicio.

Marc NOULIN (91.11.07).



Centmil personoj el tuta Jugoslavio postulas pacon dum la manifestacio en Sarajevo - julio 1991.

Pacan Novan jaron 1992 deziras al ĉiuj

la Redakcio



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO ! LANTI

El la redaktejo

Karaj gekamaradoj,

jen, denove unu plia jaro finiĝis kaj komenciĝas la nova. La pasinta jaro estis vere plenplena da eventoj, kiujn oni eĉ ne povis imagi. La vizaĝo de Eŭropo tute ŝanĝiĝis, kaj tio alportis al SAT multe da novaj membroj el la landoj kie antaŭnelonge ni praktike ne povis havi membrojn. Tio vere ĝojigas nin.

En la sama jaro komenciĝis milito en Jugoslavio, kie la armeo atakas propran popolon, mortigas senkulpajn civilulojn, detruas urbojn kaj vilaĝojn, historiajn monumentojn, nur pro deziro konservi siajn proprajn privilegiojn. Ni esperas, ke tre baldaŭ niaj membroj el Kroatio rehavos pacon kaj povos rekonstrui siajn domojn.

Kiel vi povas konstati, tiu ĉi numero de Sennaciulo estas denove 12-paĝa kaj ni esperas povi daŭrigi tiel dum la tuta jaro. Ankaŭ reaperas "SAT-Erinaco", kiu aperos nur kiam ni havos interesan materialon. Tio dependas de vi. Kunlaboru en Sennaciulo, ĉar ĝi estas via gazeto. Nur per viaj aktualaj informoj ni povas daŭre aperigi interesajn kaj kvalitajn numerojn. Aldonu ilustraĵojn, kiuj altiras intereson de niaj legantoj.

Nu, mi finu tamen per bondeziroj al ĉiuj niaj membroj, kiel tio estas kutimo okaze de la jarŝanĝo. La nova jaro alportu al nia laborista movado multe da sukceso en la disvastigo de niaj ideoj, novajn membrojn kaj kunlaborantojn, kaj ankaŭ novajn financajn rimedojn kiuj estas nepre necesaj por la plenumado de niaj eldonaj agadoj.

Al ĉiuj pacon kaj sanon deziras,

via Redaktoro.

PAGIS HELPKOTIZON:

__En Francio__: Lisa kaj Jacques Bannier, J.L. Bergeon, M. Maurin, R. Grandière, L. Grandière, D. Noel, R. Michaud, G. Michaud, M. Moreau, S. Bernard, G. Lebec, O. Castelvi, H. Lalanne, J. Caubel, G. Waringhien, A. Rispal, J. Angot, F. Degoul, Y. Nicolas, A. Houlgatte,
__En Svedio__: Jonasson, Orre, P. Persson, Hakansson,
__En Germanio__: E. Hockwin, K.E. Paech, F. Knöferl, v.d. Heid,

HELPO AL LA ASOCIO

En Francio (FF) Bergeon 40,00, Dimoulin 25,00; Pierre 300,00; Bès 120,00; Pontnau 65,00; D. Noel 485,00; G. Thiollet 150,00; S. Calas 70,00; H. Plaisant memore al ge-Glodeau 720,00; M. Rémy 20,00; O. Castellvi 200,00; P. Mary 65,00; G. Rollin 100,00; G. Waringhien 235,00; A. Rispal 350,00; P. Fort 235,00; MKE 66,17 (400 BF), A. Houlgatte 212,00;
En Aŭstrio (Ŝil.) Wieser 90,00; Hubalek 30,00; Karner 80,00; Patek 110,00; Schweighart 70,00; Haberl 30,00; Volek 480,00; Schügerl 70,00;
En Svedio (Sv.Kr.) Karlsson 690,00; Holender 10,00; Jonasson 50,00;Kakansson 500,00; Gahlin 250,00; Memore al k-do Ivar Landen: P. Persson 1000,00; I. Paulsson 200,00; M. Gahlin 200,00; Huskvarna E-Klubo 1000,00; Unuopaj membroj de Huskvarna E-Klubo 1000,00;
En Germanio (DMk) Kersting 14,00; Schut 30,00; Hockwin 6,00; Anger 24,00; Paech 200,00; Knöferl 72,00; Böhringer 50,00; v.d. Heid 56,00;

SOLIDARSERVO

En Francio (FF) Bergeon 45,00; R. Michaud 50,00; MKE 16,54 (100 BF)
En Germanio (DMk) Izacard 10,00; Brandenburg 20,00;

NEKROLOGO

En Lelystad, Nederlando, mortis la 15-an de novembro, nia malnova membro, kamarado

D.G. GOSLINGA (matr. 29.144)

Ni kondolencas al la edzino kaj aliaj familianoj.

*****

La 11-an de novembro forpasis nia kara amiko el Huskvarna, kamarado

Ivar LANDEN (matr. 27.344)

Li ĉiam estis fidela al nia movado, kaj eĉ lastminute li estis survoje por organizi E-kurson. Lia unua SAT-kongreso estis Roterdama en 1937 kaj poste sekvis multaj aliaj. En SLEA, li ofte prezidis dum la jarkunvenoj. Ni kondolencas al la edzino Astrid, la geparencoj kaj geklubanoj en Huskvarna. Li restu longe en nia memoro.

*****

Ni ĵus eksciis, ke en Saint Nazaire (Francio) mortis nia malnova membro, kamarado

Roger LE ROMANCER (matr. 27.268)

Ni kondolencas al la familianoj kaj al la grupo de Saint Nazaire.

*****

La 2-an de decembro, en Pontarlier (Francio), mortis nia kamaradino,

Marcelle TURIN (matr. 33.161)

Ni kondolencas al la infanoj.

*****

La 2-an de septembro 1991 mortis en Eaubonne, (Francio) nia malnova kaj fidela membro, kamarado

René GERAUD (matr. 21.378)

Ni konfolencas al familianoj.

Asocia sidejo de S.A.T.,administrejo kaj redaktejo:
67, avenue Gambetta, F-75020 Paris, tel: (1)47.97.87.05
Oficejo malfermita: lunde 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo:9h30-16h30.
Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata telefona registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta komitato.- J. Bannier, P. Lévy kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ.
Ekspedejo de Sennaciulo: W. Quispel, Dennendaal 64, NL-3075 ZC Rotterdam.
Poŝtkonto je nomo:Admin.Sennaciulo n° 668.651 Rotterdam.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Presita ĉe: Grafisch Bedrijf Tuijtel B.V., Hardinxveld Giessendam,Nederlando.
Aperas monate.

Bulgara Esperantisto
monata organo de BEA
- varia kaj intereskapta enhavo, riĉe ilustrita per bonkvalitaj fotoj kaj grafikaĵoj;
- aktualaj artikoloj kaj informaĵoj pri la bulgara kaj tutmonda E-movadoj;
- legindaj publikaĵoj en la rubrikoj: "Originala verkaro", "Esperantologio kaj interlingvistiko", "Lingvaj demandoj", "Juna esperantisto", "Verdaj steletoj" (porinfana), "Leteroj de korespondamikoj", "Deziras korespondi", "Distra paĝo" k.a.
- legantoj en pli ol 51 landoj.

Jarabono: 32 ned. gld. aŭ egalvaloro. **Abonebla** ĉe la Libroservo de UEA, naciaj poŝtoj kaj ĉe perantoj en multaj landoj. **Petu provekzempleron** ĉe la Redakcio: Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofio.

65-a KONGRESO DE S.A.T.

05.08.1992 - 15.08.1992

EN KAUNAS - LITOVIO

ORGANIZA KONGRES-KOMITATO:
Prezidanto: Povilas JEGOROVAS
Sekretario: Rima SKUDZINSKIENE
Kasisto: Viktoras BANIULAITIS

Aliĝ-kontaktadreso: 233000 KAUNAS - C, ab.k. 167, Litova esperanto-Asocio, Litovio. Oficeja telefono 7-0127-208503 (landa kodo, urba kodo, numero)
Telekso 269806 BOOK SU
Telefakso: 7-0127-204970. Aldonu vorton Esperanto.

Ĉi aliĝilon bonvolu sendi al la kontaktadreso (tiuj, kiuj pagas tra SAT-Centro, bv. aldoni kopion de aliĝilo).


Aliĝantoj	Kotizkategorio **A - en F.F.**			Kotizkategorio **B - en Rubloj**			Kotizkategorio **C - en Rubloj**		
	Ĝis 1.3.92	Ĝis 1.5.92	Poste	Ĝis 1.3.92	Ĝis 1.5.92	Poste	Ĝis 1.3.92	Ĝis 1.5.92	Poste
SAT-membro	250,00	300,00	350,00	50,00	55,00	60,00	30,00	40,00	50,00
SAT-geedzoj	400,00	450,00	500,00	70,00	80,00	90,00	50,00	60,00	70,00
SAT-gejunuloj (15-25 j.)	125,00	150,00	175,00	25,00	30,00	35,00	45,00	25,00	35,00
Gasto	350,00	400,00	450,00	65,00	70,00	75,00	40,00	50,00	60,00
Gast-geedzoj	500,00	600,00	700,00	100,00	110,00	120,00	60,00	80,00	100,00
Gast-gejunuloj (15-25 j.)	175,00	200,00	225,00	35,00	40,00	45,00	20,00	30,00	40,00

RESTADKOSTOJ	Kategorio **A - en FF**	Kategorio **B - en Rubloj**	Kategorio **C - en Rubloj**
Junulgastejo	1500,00	300,00	200,00
Plurlita ĉambro	2000,00	350,00	250,00
Unulita ĉambro	2500,00	400,00	300,00

Kategorio A - en F.F.: Kongresanoj el pagipovaj landoj - pagu la kotizon al Parizo, al poŝtkonto de SAT, n° 1234-22 K, Paris aŭ per karto "VISA" (nepre indiki, per legeblaj literoj, la numeron de via karto kaj ĝian validlimdaton).
Kategorio B - en Rubloj: Kongresanoj el ekssocialismaj Eŭropaj landoj, kaj aliaj neriĉaj landoj, pagu surloke, veninte al la kongreso, laŭ dato de via aliĝilo, ricevita de Organiza kongreskomitato.
Kategorio C - en Rubloj: Kongresanoj el Sovetunio kaj ĝiaj estintaj kaj nunaj respublikoj sendu la monon al la kasisto de la kongreso, k-do BANIULAITIS Viktoras, Zigmo, 235800 Klaipeda, ab.k. 168, Litovio.



Monumento al Libereco en Kaunas





Urbodomo de Kaunas

KRIMOJ DE USONO

La 30-an de septembro 1990, la usona televido montris, kion la usonaj soldatoj faris en Panamio. Kun la preteksto kapti **unu homon** (Noriega), ili ne hezitis murdi milojn da senkulpaj civiluloj (tio estas urbanoj, simplaj civitanoj - ne soldatoj nek policistoj). Laŭ la televido, ili ĵetis kadavrojn per buldozoj en grandajn fosojn, sen ceremonio, sen identigo. Neniu klopodo estis farita por noti iliajn nomojn, sciigi parencojn ktp. Iu, kiu deĵoris en la aerhaveno de Panamo (ĉefurbo de Panamio), kaj sukcesis eskapi la senkompatan kaj sencelan amasmurdon de nebatalantoj, rakontis jene: "La malmultaj soldatoj kaj policistoj, kiuj kutime gardis la aerhavenon, sciante ke la usonanoj estis alvenintaj, forlasis la lokon. Eĉ ne unu soldato, policisto aŭ armita homo restis en la aerhaveno. La restantaj gelaboristoj, kontoristoj, biletvendistoj ktp, kiuj kun bonveniga rideto sur la lipoj atendis la usonajn soldatojn, ne ridetis longe. La usonanoj envenis maŝinpafante en ĉiu direkto, al ĉiu vivanta estaĵo. Kompreneble, la deĵoristoj tuj klopodis fuĝi, sed la invadantoj pafadis al iliaj dorsoj dum ili forkuris."

Tiam oni montris en la TV la klopodojn ankoraŭ faratajn de la popolo por identigi siajn malaperintajn familianojn. Per potencaj maŝinoj oni elfosas truojn en la grundo kaj eltiras kaj kuŝigas en longa vico la kadavrojn jam putriĝantajn dum pli ol ses monatoj. Gepatroj serĉas perditan fil(in)on; virinoj serĉas perditajn edzojn kaj estis tre malfacile identigi la restaĵojn. Malgraŭ la ega malbonodoro, ili serĉas kaj klopodas legi identigilojn trovitajn en poŝoj, aŭ, netrovinte ilin, rigardas en buŝoj por rekoni dentojn, aŭ ekzamenas ringojn restantajn sur fingraj ostoj. Tiuj kiuj rekonis amitan parencon senkonsole eksplodis en ploro. Aliaj, ne trovinte parencon en unu vico, iras al alia vico de kadavroj en alia parto de la urbo, kaj al alia, dum la maŝinoj senlace elfosas tunojn da grundo miksita kun homaj korpoj.

Usono diras ke ili mortigis 202 "malamikojn" dum la invado de Panamio. Granda mensogo, diris la homoj en la elsendo. Oni jam estas trovintaj pli ol kvarmil* murditojn, kaj la serĉado daŭras, ĉar oni ĵetis ilin en kaŝitajn lokojn sen ia ajn indikilo.

Panamanoj neniam pardonos, ke iliaj amataj parencoj estis murditaj sen kialo kaj forĵetitaj kvazaŭ ratoj...

S. Docal

(*) kvarmil murditoj nun ŝajnas troigo. Novaj ciferoj konfirmas 2000 murditojn.

MULTPARTIISMO EN EBURA BORDO

Ekde nia sendependiĝo en la jaro 1960, la konstitucio de nia lando jam havis artikolon pri la multpartiismo, sed tio neniam estis permesita. La partioj, kiuj naskiĝis en tiu momento, estis tuj malpermesitaj. La popolo vivis sub la premo de unikpartia diktatoro. La konstato estas, ke la registaro ne plu kapablas reguligi la problemojn de la popoloj de nia lando sociaj (pro manko de laboro), edukaj, ekonomiaj kaj politikaj. Jam pasis dek jaroj dum kiuj ne plialtiĝis la salajroj kaj la vivkostoj grimpas ĉiujare.

Ĉio komenciĝis en februaro 1990, kiam la studentoj, nekontentaj pro pluraj kialoj, komencis organizi manifestaciojn, strikojn. Ĝin partoprenis solidarece la liceanoj kaj kolegianoj. La polico intervenis. Oni nombris multajn arestitojn kaj vunditojn. Vendredon, la 2-an de marto okazis grandegaj kaj perfortaj manifestacioj de studentoj, liceanoj, kolegianoj kaj kelkaj laboristoj. Sekve la registaro anoncis la fermon de ĉiuj lernejoj en Abiĝano kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

La opoziciaj partioj, kiuj ĝis tiam estis kaŝitaj, ekaperis. La situacio estis tre malbona. Pluraj intervenoj tra la ŝtata gazetaro de registaranoj, sindikataj ĉefoj kaj asocioj ne sukcesis kvietigi la studentojn kaj aliajn civitanojn en Abiĝano. La registaro tamen malfermis la lernejojn, sed la geinfanoj ne plu deziris iri tien kaj daŭrigis la strikojn, la manifestaciojn. La ĝendarmoj intervenis kaj okazis mortigo de unu lernanto en Adzopé, sud-oriente de la lando. La registaro superbordigita de ĉie, dekretis "blankan jaron".

Sed la politika kaj socia situacio malnobliĝis kiam la registaro anoncis la redukton de la salajroj de la ŝtatoficistoj je 25 %. La krizo estis tiel akra, ke la registaro ne plu povis regi la landon, tiel la politika buroo kunvenis la 3-an de aprilo kaj decidis permesi la kreadon de aliaj politikaj partioj en nia lando. Tio estis tre granda evento, neforgesebla evento por la popoloj de Ebura Bordo.

Tiel naskiĝis ĉe ni la multipartiismo kaj la demokratio.Tio permesis la kreadon de 39 novaj partioj el diversaj tendencoj. Ni estas en multpartiismo, sed la demokratio ankoraŭ ne eblas, ĉar la malnova partio, kiu ankoraŭ regas, tion ne permesas. Antaŭ la kresko de la demokratiaj fortoj la registaro uzas diversajn minacmetodojn: malpermeso al la opozicio uzi la nacian gazetaron, mensogon, arestojn, brutalecon kontraŭ la loĝantaro, enkarcerigojn ktp.

Ĝis nun, la politika kaj socia situacio estas tre malsana pro la multnombraj manifestacioj kaj strikoj de la lernantoj kaj profesoroj.

La Eburianoj ankoraŭ soifas kaj malsatas de demokratio.Ni komprenis ke ne sufiĉas demokratia multpartiismo, sed ke multpartiismo kaj demokratio devas funkcii kune, duope. Sen demokratio la partioj ne povas libere funkcii.

En ĉiu aĵo oni devas eksperimenti por akiri spertojn. Ni tion jam faris pasintjare. Nia popolo havas spertojn por daŭrigi la batalon. La popolo venkos.

H. SEKA

LIBERPENSULA FRAKCIO

Tridek-kvin personoj ĝin partoprenis. Estas aludita la fakto ke necesus ke aperu ligilo - bulteno. Ĉu estas kandidatoj inter la SAT-membraro por ĝin prizorgi? Nikolao GUDSKOV (Moskvo) prezentis sufiĉe detale la nunan situacion de la Eklezioj en Sovetunio. Post la malapero de la laika religio (marksismo-leninismo) reaperas la religioj, kun la subteno de la liberaluloj (fakte ekskomunistoj, konservativaj kaj falsaj liberaluloj). Ni memoru pri la benado de Jelcin fare de la ortodoksa patriarko. En Ukrainio ekzistas kvar eklezioj: rusortodoksa, memstara ortodoksa ukraina, romkatolika, "uniata", kiuj inter si disputas la preĝejojn. Diversaj diservoj okazas ĉe la televido. Oni povis ricevi religian instruon en dimanĉaj lernejoj aŭ en nedevigaj kursoj en publikaj lernejoj.

Ivo Peyraut informas pri la afero de la vualo en Francio: junulinoj islamaj provis porti islaman vualon kaj ne partopreni la gimnaziajn kursojn. Francio estis dividita en poraj kaj kontraŭaj klanoj. Fine la instancoj decidis favore al la kontraŭa parto de la opinio kun rimarko: estas de nun malpermesita surporti emfazajn religiajn objektojn. Naskiĝis nova polemiko. La katolikoj volas enkonduki la instruadon de la historioj de religioj en la publikajn lernejojn, sed kontraŭ tiu projekto kreiĝas forta opozicio.

Dum la kunsido, iu belga katolika instruisto intervenis kaj provis (ne tre sukcese) konvinki la ĉeestantaron pri la ebleco dialogi inter laikuloj ka religiuloj. Sur la sindikatista tereno, tio eblas, sub certaj kondiĉoj.

Kelkaj intervenantoj substrekas la ligon inter naciismo kaj religio, inter raciismo kaj religio.

Konklude: disvastigi la vendon de la libro de A. Lorulot "Kial mi estas ateisto" ?. Ĉu la libroservoj de la LEA-oj posedas ĝin?

SAT 29.215

*40 FF plus afrankokostoj, ĉe SAT.

Amnestio Internacia

MEKSIKIO

Malliberuloj estas ofte torturataj

Amnestio Internacia deklaris la 18-an de septembro 1991, ke torturoj estas preskaŭ ĉiutage menciataj en Meksikio, kaj ke ĉiuj arestitoj riskas esti torturataj jam de sia aresto fare de la polico aŭ la armeo.

En sia raporto, la organizo mencias, ke malgraŭ la graveco de la problemo, la meksikiaj aŭtoritatoj praktike nenion decidas por ĉesigi la torturon kaj la mistraktojn.

Tre malmultajn enketojn ordonas la tribunaloj sekve de plendoj pro torturo, kaj la supozataj kulpuloj nur malofte estas prezentataj al la justico, kio favorigas la sinturnon al tiu praktiko.

Centoj da kazoj de torturo, ofte kaŭzintaj la morton de la viktimoj, estis menciitaj al la organizo dum la du pasintaj jaroj, sed la reala nombro verŝajne estas multe pli alta.

Inter la ĉefaj torturmetodoj listigitaj de Amnestio Internacia estas la frapoj; kvazaŭsufokado, ĉe kiu la kapo de la viktimo estas ĉu kovrita per plasta sako, ĉu tenata sub akvo; la trudenkonduko en la nazon de akvo kun pimentpulvoro kaj la elektraj malŝarĝoj. Oftaj estas ankaŭ mortminacoj kaj ekzekutŝajnigoj.

En la ŝtato Michoacan, la urbestro de Aguililla, Salomon Mendozā Barajas, estis sovaĝe torturata, ĉar li denuncis la atencojn kontraŭ la homrajtoj faritaj dum kontraŭnarkotaj operacoj en lia regiono. Tiu viro estis tuj arestita, kiam li iris al la kazerno, kie estis bazitaj la sekurecfortoj, por renkonti la majoron. Laŭ siaj deklaroj, li estis ĵetita surteren, kun kovritaj okuloj, frapita per piedoj kaj piedpremita. Poste oni kovris lian kapon per plasta sako, samtempe pugne batante lian vizaĝon kaj lian ventron.

Li restis mallibera dum sep monatoj antaŭ ol oni liberigis lin sen akuzo en decembro 1990, sekve de internaciaj protestoj. La justica enketo malfermita post lia liberigo estis tute nesufiĉa, kaj la plej multaj el la supozataj kulpuloj plu estas liberaj.

En ŝtato Chihuahua, Victor Manuel Oropeza, kuracisto kaj aktivanto por homaj rajtoj, estis ponardita en sia medicina kabineto en julio 1991. Li ricevis mortminacojn, publikiginte serion da artikoloj en lokaj gazetoj por denunci la atencojn kontraŭ homrajtoj imputeblaj al la sekurecfortoj. Ŝajne tiu viro estis torturata antaŭ la mortigo. Liaj familianoj, lokaj asocioj por la defendo de la homaj rajtoj, kaj eĉ registaraj respondeculoj, kritikis la malregulaĵojn, kiuj ŝajne nevalidigas la polican enketon.

La viktimoj de la torturo apartenas al ĉiuj sociaj tavoloj. Oni trovas inter ili personojn malliberajn pro politikaj motivoj, aŭ en la kadro de kontestoj pri bienoj, aktivantojn por homrajtoj, aktivantojn de indiĝenaj kolektivoj, sindikatanojn, advokatojn, komunjurajn suspektatojn. Eĉ la infanoj ne estas domaĝataj, kiel atestas multaj kazoj konigitaj al Amnestio Internacia.

Laŭ la organizo, tiuj sistemaj malobeoj kontraŭas la ripetitajn sindevontigojn de la meksikia registaro respektigi la homrajtojn. Serio da leĝaj kaj administraciaj decidoj estis faritaj de post 1986 por lukti kontraŭ la torturo kaj la mistraktoj, sed ili ne ebligis ĉesigi tiujn praktikojn.

Meksikio ratifikis preskaŭ ĉiujn internaciajn traktatojn pri la homaj rajtoj, notinde la Konvencion de la Unuiĝintaj Nacioj kontraŭ la torturo. La aŭtoritatoj kreis Nacian Komisionon pri la homrajtoj kaj faris multajn deklarojn favore al pli granda respekto de la fundamentaj rajtoj. La meksikia Kongreso adoptis federacian leĝon, kiu igas la torturon krimo, kaj antaŭvidas la enkarcerigadon de tiuj, kiuj prikulpis aŭ ordonis tiajn agojn. Multaj meksikiaj ŝtatoj adoptis similajn decidojn.

Tamen Amnestio Internacia plu ricevas multajn informojn menciantajn atencojn kontraŭ homrajtoj. La konstituciaj garantioj estas konstante malobeataj kaj la helprimedoj, pri kiuj disponas la viktimoj de torturo kaj iliaj familianoj, estas nur malofte efikaj. Kiam ili provas akiri riparojn, la viktimoj kaj iliaj familianoj estas minacataj, timigataj kaj foje forrabataj kaj torturataj.


Eĉ en la kazoj, kiam medicinaj atestoj aŭ aliaj pruviloj pravigas la asertojn pri torturo de la malliberuloj, la juĝisto ofte konsideras, ke tio ne influis la kulpokonfesojn kaj rifuzas malfermi enketon.

Amnestio Internacia admonas la meksikian registaron tuj fari efikajn decidojn por ĉesigi la daŭrajn atencojn kontraŭ la homrajtoj. Ĝi postulas la forigon de la arbitraj arestoj kaj la striktan kontrolon de la pridemandadaj proceduroj, la malpermeson uzi kulpkonfesojn truditajn per torturo, kaj la ekaplikadon de la justicaj garantioj.

La organizo konsideras ankaŭ, ke ĉiuj plendoj pro torturo devas senprokraste okazigi justicajn enketojn, kaj ke la torturintoj devas esti prezentataj al la justico, por garantii, ke tiuj misagoj ne estos plu tolerataj.

J. L.

Ĉu vi jam pagis vian kotizon ?



LETERAMIKOJ

- D-ro Konstantin Georgiev Kacarov, 36-jara dentisto, deziras korespondi kun geesperantistoj el Anglio, Hispanio, Portugalio, Usono, Aŭstralio kaj Novzelando pri ĉiuj temoj. Bonvolu skribi al : D-ro Konstantin Kacarov, Zahari Zograf 28, BG-2000 SAMOKOV, Bulgario.
- Juna, 20-jara studentino deziras trovi geamikojn el la tuta mondo. Ŝi lernis Esperanton antaŭ unu jaro kaj deziras korespondi pri arto, vojaĝoj kaj aliaj temoj. Skribu al: Olga Bulanova, jaroslavskoje ŝosse, 12-95, SU-129348 MOSKVO, Sovetio

Vi sciu ke ....

- la AGLI (Esperantista Go-Ligo Internacia) alvokas ĉiujn Go/Vejĉi/Badukludantojn esperantistajn partopreni en la mondvasta III-a Internacia Koresponda Go-Turniro. Ĝi komenciĝos en januaro 1992. Interesuloj bonvolu enskribiĝi ĉe la turnirgvidanto: Matthias REIMANN, Platz der Freiheit 20, D/O-5503 ELLRICH, Germanio.
- Dum la U.K en Bergen fondiĝis nova internacia asocio nomata "Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo" (mallonge: Monda Kunagado). Ĉirkaŭ 60 personoj partoprenis la fondkunvenon, diskutis la statuton kaj elektis konsilantaron kiel gvidorganon de la asocio. Monda Kunagado celas agi per propraj interesaj projektoj sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, perante la ideojn de paco kaj internacia interkompreniĝo, kongrue kun la celoj kaj idealoj de Unesko kaj kunlabore kun ĝi. Unesko-sekretario sendis la salutmesaĝon al la fondkunveno. En sia mesaĝo al la UK, la generala sekretario de Unesko, F. Mayor, aparte bonvenigis la fondon de esperantista Unesko-asocio. La nova asocio eldonas la revuon "Monda Forumo". Kiu deziras kunlabori, ricevi aliĝilon aŭ ekzempleron de "Monda Forumo" kaj la statuton, informojn pri la projektoj de Monda Kunagado, aŭ iel ajn kontribui al ĝi, skribu al: Ulrich Becker, Küstriner Str. 3, D/O-1092 Berlin.

SATEB-JARKONFERENCO 1992

Ĝi okazos en Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs, ST12 9DG, dum la semajnfino 1/3a de majo 1992.

La programo inkluzivos du prelegojn de d-rino Marjorie Boulton, politikan forumon, laborkunsidojn, SAT-kunvenon, lingvan klinikon de Krys Ungar kaj paralele infangruparanĝon sub gvido de Sally Phillips (infanoj estu ne pli ol 12 jaraj). Inkluziva kosto, por unulita ĉambro 46,00 pundoj kaj dulita ĉambro 40,00 pundoj.

EKOLIGIISTA FRAKCIO

Multekostos purigi Orient-Eŭropon

Iom post iom fariĝas pli klare kiel malbona estas la situacio de la medio en Orient-Eŭropo kaj kio estas la konsekvencoj de tio rilate al la sanstato de la homoj kaj la ekonomio. Nur kelkaj impresoj pri Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario sufiĉos por iom skizi la gravecon de la minaco al pluvivado de homo kaj naturo. Poste estos priparolataj kelkaj kalkuloj el raporto de World Watch Institute, antaŭ nelonge publikigitaj pri la taksitaj kostoj de purigado.

Malpurigo minacas rekte pluvivadon de milionoj da homoj

En la pasintaj tridek jaroj la atendata vivodaŭro en Ĉeĥoslovakio malaltiĝis kiel en aliaj landoj de Eŭropo. Viroj havas averaĝan vivodaŭron de 67 jaroj, en la minejaj regionoj eĉ ankoraŭ 5 jarojn malpli. 50 % de la trinkakvo en la lando ne kontentigas la postulojn rilate al la enhavo de maksimumaj kvantoj de diversaj kemiaj substancoj. Nutraĵo enhavas same tro altajn kvantojn da pesticidoj kaj pezaj metaloj.

Duono de ĉeĥa loĝantaro troviĝas en regionoj, kie la aermalpuriĝo estas grava minaco al la sano. Triono de la slovakoj ankaŭ loĝas en malpuraera regiono. Preskaŭ duono de la riveroj estas bilogie morta. Duono de la agrikultura tero estas minacata de erozio, 80 procentoj estas acidiĝintaj. Du trionoj de la arbaroj estas malsanaj. Besto- kaj plantspecioj formortas: 5 % de la fiŝospecioj, 60 % de la birdoj, 65 % de la mamuloj.

La sekvoj por la homoj de mediomalpurigado manifestiĝas ne nur en malpli longa vivodaŭro, sed ankaŭ en diversaj malsanoj. Infanoj naskiĝas kun heredaj misformiĝoj je koro, pulmoj kaj renoj-urinvezikoj. Ili suferas pro kroni- kaj malsanoj de pulmoj, haŭtmalsanoj, alergioj, k.s.

Ekzemplo de mediomalpurigado en la urbo Usti nad Labem, norde apud Germanio, montras pli detalan bildon pri la problemaro. Apude oni elfosis brunkarbon, tiel ke la pejzaĝo ŝanĝiĝis en luna surfaco. En la urbo mem troviĝas kemia fabriko meze inter la loĝdomoj, kiuj elĵetas kloron kaj hidrargon. La akvo, kiun la fabriko uzis por produkti farbojn kaj promastrumajn kemiaĵojn, estas simple forfluigata en riveron Elbo. Apud Usti situas vilaĝo Ĥabarovice, kie troviĝas rubdeponejo jam de la jaro 1908. Oni ĵetis 4,7 milionojn da kubikmetroj da rubaĵoj sur ĝin, inter kio troviĝas diversspecaj kemiaj substancoj toksaj. Entute la deponejo ampleksas 26 hektarojn.

En Bulgario ekzistas samspeca deponejo grandskala kiu rekte minacas la vivon de multaj homoj kaj ankaŭ minacas maluzebligi agrikulturon en sia ĉirkaŭaĵo. Temas pri la barita lago de Topolnica, en centra Bulgario. La akvo de tiu lago enhavas multajn pezajn metalojn, i.a. arsenon. 160 milionoj da kubikmetroj da grave malpurigita akvo minacas elverŝiĝi sur grandan terenon ĉirkaŭ la urboj Plovdiv kaj Pazardzik. La fonto de tiuj pezaj metaloj estas fabriko, G. Damjanov-kupro-fabriko apud urbo Srednogorie. Tiu fabriko per multa energio ĉerpis pezajn metalojn (i.a. kupron) el tero kiun oni forprenis de ĉirkaŭaĵo. La restaĵo de la fabrikprocezo, kiu kompreneble ankaŭ havas sufiĉe da pezaj metaloj en si, estis forigata en ravinojn, k.t.p. sen iu speciala zorgo, tiel ke per pluvo la pezaj metaloj atingas la lagon kaj amasiĝas tie.

Malpurigo: sekvo de manko de rendimentkonscio ĉe industrio

Plejparte la mediomalpuriĝo en Orient-Eŭropo ŝuldiĝas al malmoderna industrio. Pro tio ke sub la komunistaj reĝimoj la energiprezoj estis tenataj je artefarita malalta nivelo, la industrio nun postlamas rilate al ŝparema energiuzado kompare kun okcidentaj landoj. En tiuj landoj jam de 1973 oni grandskale ŝparis energion post la unua naftokrizo.

En norda Bohemio ekzemple, pro la uzo de brunkarbo, la elĵeto de sulfurdioksido (unu el la kombinaĵoj de acida pluvo) sumiĝas je 1 miliono da tunoj jare. Tio estas kvaroble la kvanto, kiun la industrio en Nederlando elĵetas aeren jare.

Ne nur mankis konscio pri ŝparema uzado de energio kaj krudmaterialoj, sed ankaŭ mankis efektiva medipolitiko. Mankis ankaŭ la ebloj al civitanoj rezisti la malpurigadon fare de fabrikoj.

Se civitano ne havas eblecon influi la mastrumadon de fabrikoj, oni devige rezignas pri la malbona situacio. Oni ofte eĉ ne sciis kiom malbona estis tiu situacio. Ke ekzemple apud grandaj industrikompleksoj astmo kaj kancero naŭoble pli oftas en Bulgario ol en relative puraj regionoj. Infanoj de lernejo en Sillamae en Estonio perdis harojn... pro radioaktivaj rubaĵoj forĵetitaj de fabriko sur la tereno kie oni poste konstruis la lernejon. Manko de scio kaj manko de konscio...

Rebonigo de natura medio: centojn da miliardoj da dolaroj bezonataj

Ke la forigo de malpuraĵoj (toksaj deponaĵoj) kaj purigo de industriaj procezoj (per t.n. "pura" teknologio) kostas multe, estas konate en okcidentaj landoj. Montriĝas, ke tiuj purigaj aktivaĵoj ofte ne sufiĉas, tiel ke necesos limigi la industrion mem aŭ la trafikon aŭ la intensivan brutbredadon, sed ĉiukaze oni klopodas unue teknike solvi la mediproblemaron por eviti drastan falon en ekonomia aktiveco...

Tiel oni nun ekzemple en Nederlando scias, ke por forigi toksaĵojn de rubdeponejoj (kaj el ŝlimo de riverfundoj) necesos elspezi 50 miliardojn da guldenoj en la venontaj jardekoj. Antaŭ nelonge oni kalkulis ke purigaj instalaĵoj ĉirkaŭ Mediteraneo kostos 30 miliardojn da guldenoj en periodo de 20 jaroj.

World Watch Institute, konata privata instituto de ekspertoj pri mediproblemoj, faris studon pri la kostoj de rebonigo de la medio en orienta Eŭropo. Oni parte uzis rezultatojn de aliaj studoj, parte mem taksis la kostojn. Germana studo ekzemple jam kalkulis, ke por "purigo" de eksa GDR necesos 250-300 miliardoj da dolaroj.

Jen kelkaj provizoraj taksitaj sumoj de bezonata mono por diversaj landoj:

Pollando en la venontaj 10-20 jaroj bezonos 20 miliardojn da dolaroj. Ĉeĥoslovakio bezonos 24 miliardojn da dolaroj. Sed sendube la plej altan sumon bezonas Sovetunio. Nur por malpliigi la aermalpurigadon oni tie bezonas jam tuj 175 miliardojn da dolaroj kaj poste ĉiujare ankoraŭfoje 17,5 miliardojn da dolaroj.

La demando estas: kie oni trovos la monon por efektivigi tiun gigantan purigadon? La ekonomioj en la orienteŭropaj landoj malbonfartas post la ŝanĝoj politikaj kaj la ekonomia helpo el okcidentaj landoj certe ne povos atingi tian amplekson, ke oni povos efektivigi la necesajn plibonigojn en industrio, agrikulturo, energiprovizado, k.t.p. Cetere, alia aspekto povas esti, ke oni helpas per eksportado de ne tiom modernaj kaj teknologie progresintaj instalaĵoj kaj fabrikoj, tiel ke la helpo ekonomia el medividpunkto ne estas tiel bona... Fakte orienta Eŭropo bezonas la plej modernan teknologion por efike kontraŭbatali medimalpurigadon. Se oni ne postulas tion kaj kontentiĝas per malpli evoluintaj instalaĵoj brokantaj, tiam la helpo povas efektive malhelpi progreson. Unu el la faktoroj, kiuj povas influi, estas forta mediprotekta movado en diversaj orient- kaj okcidenteŭropaj landoj.

B.d.W

UKRAINIAJ VERDULOJ

La 1-2-a de junio okazis en Ternopil, la IIa Kongreso de Verdula Partio de Ukrainio (VPU). Ĝin partoprenis kune kun invititoj kaj alilandaj gastoj ĉirkaŭ tricent homoj. La partigvidanto Jurij Ŝĉerbak malfermis la kongreson per sciigo, ke antaŭ kelkaj tagoj la partio estis oficiale registrita. Astrologoj asertas, ke ĉi tiu evento okazis sub feliĉa stelo, ĉar en la sama tago estis registrita ukrainia asocio de astrologoj. Evidente, tiu stelo estas favora ankaŭ al Esperanto, ĉar la Kongreso, inter diversaj rezolucioj, akceptis tiun pri Esperanto (vidu la Rezolucion). La ĉefan meriton en tio havas partikungvidanto - esperantisto Ihor Puŝkar. en la rezolucipreparado aktive partoprenis krom ukrainaj verduloj kaj esperantistoj, ankaŭ samideanoj el aliaj respublikoj, Ajvars Kalniŝ (Latvio) kaj Nikolao Gudskov (Rusio).

Do, de nun ukrainaj verduloj - mediprotektantoj kaj esperantistoj - strebas al sia celo sub unueca verda stelo de espero.

Viktor Jaskovec (matr. 33.616)

*****

REZOLUCIO
pri l'internacia lingvo Esperanto

La 2-a Kongreso de la Verdula partio de Ukrainio

agnoskante la gravan rolon de viglaj internaciaj kontaktoj inter vastaj mediokonsciaj sociaj tavoloj en prevento de la medidegradigo;

konsciante problemojn, ligitajn kun lingva imperiismo, kaj minacajn kulturdetruajn sekvojn pro l'pretendoj de la tiel nomataj grandaj lingvoj resti sola interkomunikilo por la internaciaj kontaktoj en ajna sfero;

konsiderante, ke eblecoj de la internacia lingvo Esperanto estas uzataj malsufiĉe kaj ne ĉiam estas argumente traktataj en politikaj rondoj;

dividante koncepton de Ekologia Centro Internacia "Mondhejmo", Asocio de Verduloj Esperantistaj, Internacia artgrupo "Nula horo" pri l'interligo de ekologia konscio kaj Esperanto,

decidis:

1. Subteni la Alvokon de verduloj el Francio, Irlando kaj Italio pri utiligo de Esperanto kiel lingvo de internacia komunikado inter verdulaj partioj ("Esperanto", 1991,1).
2. Inviti al kunlaboro Ukrainian Esperanto-Asocion (UkrEA)

La 2-a Kongreso de Verdula partio de Ukrainio, Ternopil, 1991.

RAPORTO PRI LA 6-A INTERNACIA KONGRESO DE VERDULAJ PARTIOJ

La 6-a internacia kongreso de verdulaj partioj, okazinta en Zürich la 1an kaj 2an de junio, verŝajne fariĝos historia por la E-movado, ĉar tiam unuafoje E. estas aldonita (plensukcese) al la aliaj oficialaj lingvoj uzataj dum la plenkunsidoj en samtempa traduko (angla, franca, germana).

Tiu eksterordinara atingo estas konsekvenco de la poresperanta rezolucio aprobita en Marsejlo en novembro 1989 fare de la franca politika movado "les Verts", kaj de la agado farita en Italio por ĝin subteni kaj apliki.

Estas menciinde, ke la du E-tradukistoj postulis kompenson pli altan ol tiu de la alilingvaj kolegoj, kaj ke, tamen, ili ricevis tiom, kiom ili petis.

Ĉe la E-stando, malfermita dum du tagoj, haltis pluraj homoj kiuj demandis informojn pri la E-movado. Inter ili, la itala deputito Francesco Rutelli, estrarano de la verdula partio (vidu foton).

En la konvinko, ke la agado ĉe la partioj kaj politikaj movadoj verdulaj estas eksterordinare fruktodona, grupeto da italoj kaj kelkaj membroj de la E-Komisiono de la franca movado les Verts decidis starigi - laŭ la celoj kaj strategio ĉi tie aldonitaj, "Verdula E-Asocio"-n, por pli bone kunordigi kaj ekspluati la agadeblecojn de la diverslandaj unuopaj esperantistoj.



Itala deputito Francesco Rutelli, verdula estrarano.

La provizoraj internaciaj VEA-estraranoj estas:

prezidanto - Auguste Huberdeau, 10 rue Albert Mezergues, F-72100 Le Mans

sekretario - Alberto Menabene, Via Monti Sibillini 3, I-00141 Roma

kasisto - Giancarlo Rinaldo, Via Savonarola 65, I-35137 Padova

Provizora jara kotizo: 37,9 ned. guldenoj, pagebla al la kasisto.

La sekretario de la E-Komisiono de "Les Verts", Charles DUMONT

SKUIĜO DE MUTACIANTA ALĜERIO

Demokratio: remparo kontraŭ integrismo

Tunizia ĉiusemajna gazeto laŭtege ekalarmas koncerne la fre7datajn eventojn. La pligraviĝo de la integrismo konsistigas ĝis-ekstreme gravan danĝeron por ĉiuj magrebaj landoj. Urĝegas reagi. Necesas kontraŭstari la totalitarisman malprogreseman integrismon per demokratigado kaj de la 7tato kaj de la socio. La magreba socio suferas pro grava moderneca manko (...) t.e. pro manko de demokrateco, egaleco, toleremo (...). Kontraŭi la integrismon ne signifas nur kontraŭi la politikan projekton (...), sed ankaŭ kontraŭi la malprogreseman kulturon, kiun ĝi portas en si kaj kiu ĝin nutras.

Salah Zeghidi - Réalités (Tunizio)

*****



Studentinoj en Alĝerio.

Tio, kio okazas en Alĝerio, ĉefe de antaŭ kelkaj tagoj, estas tre ege grava. Ne nur por Alĝerio, sed por ĉiuj magrebaj landoj.

Jen la integrismo malka7e, kun sia malbelega vizaĝo de maltoleremo, agresemo, fizika perfortemo, organizata teroro, kiel reg-kaj kontrolsistemo, t. e. kiel sistemo de subpremado kontraŭ la oponantaj gecivitanoj, kontraŭ la demokratoj, kontraŭ la nevualitaj virinoj, solaj, vidvinoj aŭ eksedzinoj, la virinoj laikaj, 7minkitaj, unuvorte kontraŭ ĉiuj virinoj, kontraŭ la malplimulto, la "eksterleĝuloj", la intelektuloj kulpigitaj pro "okcidentaneco", kontraŭ la sindikatistoj, "kulpaj" penetrigi en niajn landojn la sindikatismon tiun "aberacion", kontraŭ la politikaj partioj, kiuj bazas sin sur valoroj (konstitucio, plurismo, libereco je penso, kredo, esprimiĝo k.t.p.) valoroj malaj al la "charia"...

Jen estas do la integrismo, kun sia aŭtenta vizaĝo, kun la vizaĝo de la primareco, de la malklereco, de la malamo, kiu vokas al si la plej malnoblan internon de la homo kaj kiu pretendas starigi 7taton kaj mondordon gvidatan, ankaŭ en la ĉiutaga vivo, de dervi7oj dezirantaj kontroli nian sanktecon aŭ nian profanecon, nian penson kaj nian sintenon, nian nunan vivon kaj nian devenon, kiuj volas senigi nin je nia inteligento kaj de nia racio... Jen estas la integrismo sen konscienco nek regulo, tia, nur kia ĝi povas esti... Jen la integrismo, kun kiu certaj politikistoj, pro oportunismo aŭ pro malkuraĝo, pensis ke ili povas kompliciĝi...Jen la integrismo kiun certaj ja tro longatempe kredis "integrigebla" en la demokratian sistemon ...Ĉu ili persistos ludi kun la fajro, kun risko bruli kaj nin ĉiujn kunbruligi? Trans la kapeloj, kiuj povas riveliĝi ridindaj, trans la regado de unu nura, kiu povas montriĝi tragike fragila, ĉu ne pli kaj pli evidentiĝas ke reago, reagego rivelas sin absoluta neceso? Ke vera reklivado devas okazi, ne sub formo de "historia bloko" nur defenda, sed ja ataka, agema, entreprenema; kaj tra la 7tataj institucioj kaj tra la civita socio.

Ne estas eĉ nur minuto perdinda: minuto, kiun ni perdas, ne estas perdita de ĉiuj... ne estas mil manieroj por defendi la civitan socion, estas nur unu: ĝuste tiu, kiu konsistas en konstruado de tiu civita socio, ĉar ĝi estas nur en gravedeco. Ĉar nia socio, laŭgrade de la valoroj kiuj ĝin trairas havas grandan malfruon pri moderniĝo, racieco, progreso.

Fronte al la retroemaj valoroj, kiuj persiste ĉeestas niajn sociojn (malegaleco, maltoleremo, malracieco, malcivitismo k.t.p.) endas laŭdegi, diskonigi, promocii ĉie la valorojn de la moderneco, t.e. de la demokrateco, de la egaleco, de la homrajtoj. Kontraŭstari la totalitarisman retroeman integrisman danĝeron, tio estas demokratigi la 7taton kaj la socion. Ne povas esti demokrata 7tato en ne demokrata socio. La demokrataj valoroj ne estas nur aro da reguloj devantaj regi la "politikan socion". Ili estas ankaŭ aro da reguloj, praktikoj, sinteno, konceptoj devantaj regi la homajn rilatojn, la sociajn rilatojn, t.e. demokratia kulturo... eĉ se min mirigas, eĉ 7okas, mi konsideras ke la plej demokrata reformo realigita de post 1956 ne estas la starigo de la politika plurismo, nek la forigo de la dum tutviva prezidenteco kaj aŭtomata heredado; tio estas la proklamado de la kodo pri persona statuso (CSP) antaŭ preskaŭ 34 jaroj... Se la demokrateco signifas pli da egaleco, tiu proklamado estis nekontesteble la plej demokrateca reformo realigita de nia lando depost kiam ĝi akiris sian sendependecon.

Urĝas ja ekagi. Estas multo farenda. Nia lando, nia socio bezonas grandajn demokratajn reformojn, tiajn kiaj igas la progreson ne retroebla... Ni demokratigu la 7taton kaj la instituciojn, jes, ja, sed ankaŭ la entreprenojn, la familiojn, la lernejon, la asocian vivon, la kulturan vivon, la spacojn en kiuj la homoj ĉiutage vivas, agas intervenas... Ja la diktaturo, la regado individua, la monopoligo de la povo kaj de la decido, ja la senrespondeciĝo, la persisteco de la senscio kaj de la analfabeteco, ja ĉio ĉi helpas la fa7ismon, preparas ĝian liton, tiun de la individuismo, de la seninteresiĝo, de la regionismo kaj de multegaj pluaj malbonoj.

Kontraŭbatali integrismon signifas ne nur kontraŭstari politikan projekton, tio signifas ankaŭ kontraŭstari malprogreseman kulturon, kontraŭstari la integrismon estas lukti por aro da valoroj super ĉiuj kampoj: de la profaneco, tra la rilato inter la homo kaj la naturo, inter viroj kaj virinoj, inter la homoj, inter la popoloj, inter la nacioj, inter la 7tatoj...

Oni povas bati la integrismon en ĝia politika esprimo, sed oni povas venki ĝin nur venkante super la kulturo, je kiu ĝi estas graveda kaj kiun ĝi nutras.

Por nun la eventoj ĵus okazintaj en Alĝerio kaj Tunizio klare montris, ke la demando ne plu estas: ĉu eblas konstrui demokration kune kun la integristoj, sed ĉu la demokratio povas konstruiĝi nur sen ili aŭ nepre kontraŭ ili.

El "Courrier International" n° 32

Esperantigis M.T.

Ĉu vi jam legis ?

SENNACIECA REVUO 1991

Interesega legaĵo por ĉiu esperantisto !

VIAJ OPINIOJ

Pri la enhavo respondacas la aŭtoroj mem

ANKORAŬ PRI KLASBATALO

Niaj junuloj iomete pravas asertante, ke ili ne bone komprenas, kial SAT tiel energie substrekas la klasbatalon. Fakte en la industriigitaj landoj, kie loĝas 95 % de SAT-anoj, la socialaj konkeroj akiritaj per la sindikataj kaj politikaj luktoj de tri generacioj certigas sufiĉe akcepteblan vivnivelon al la laboristoj. Eĉ oni konstatis, ke kontraŭ la antaŭvidoj de Marks, tiajn konkerojn oni akiris ankaŭ sen diktaturo de la proletaro. Male, kvazaŭ paradokse, la vivnivelo de la laboristoj pliboniĝis pli rapide en la kapitalismaj landoj ol en la komunistaj. Eble ĉar en tiuj lastaj ne transprenis la politikan povon la reprezentantoj sindikataj, libere elektitaj balote kaj ofte anstataŭitaj per la laboristoj, sed la povo estis uzurpita per nemovebla kvazaŭ militista hierarkio de unuura despota partio.

La klasbatalon ne eltrovis la ekspluatitaj proletaj amasoj, sed idealistaj intelektuloj pro homarana solidareco, en historia momento dum kiu la mondo estis dividita en senkomunikiĝaj partoj, kaj en la eŭropaj landoj industriiĝantaj la proletaro estis terure ekspluatata.

Hodiaŭ la situacio estas tre malsama. La mondo pli kaj pli malgrandiĝas; komunikado kaj vojaĝado pli facilaj, malmultekostaj kaj rapidaj igas Parizon pli proksima hodiaŭ al Pekino aŭ Buenos-Aireso, ol antaŭ cent jaroj al Marsejlo: telefono, televido kaj telefakso (telekopiilo) tuj kontaktigas nin ĉiutage kun la tuta mondo, kaj ni bone scias ke en tiu ĉi granda homa familio nun regas maljusteco eĉ pli netolerebla ol tiu, kiu antaŭ cent jaroj regis inter riĉuloj kaj proletoj en la eŭropaj landoj. Evidente temas pri la tiel nomata "tria mondo".

La homara solidareco, kiu animas la sanajn junulojn de nia epoko, sin adresas do al tiu duono de la homaro, kiu subpremata kaj ekspluatata de la dek landoj plej riĉaj, suferas la plej teruran mizeron.

Mi kredas la klasbatalon ankoraŭ tre necesa ankaŭ en la evoluintaj landoj por defendi la konkerojn, kiujn hodiaŭ ĝuas la laboristoj. Sen senĉesa lukto, registarestroj kiel la ĉefministro Thatcher sukcesus tre rapide neniigi ĉiujn konkerojn realigitajn de la generacioj, kiuj antaŭiris nin.

Sed mi opinias, ke estus oportune aldoni al SAT-Statuto la celon lukti por la rajtoj de ĉiuj homoj kaj de la subpremataj ĝenerale, ankaŭ se ili ne estas "proletoj", sed nur mizeraj uloj, kiuj neniam trovis laboron, kaj kontraŭ ĉia diskriminacio.

Ŝajnas al mi, ke tiu principo jam estas en la spirito de SAT, sed eble la junuloj, kiuj kritikas la vorton "klasbatalo" ŝatus vidi ĝin pli klare esprimita en nia Statuto.

J. Magrini (matr. 33180)

*****

MI PETAS KLARIGON

Antaŭ la diskrevo de la orienteŭropaj landoj, miaj de antaŭ sesdek jaroj socialistaj konvinkoj ŝanceliĝis! Pro tiu diskrevo, mi petas de vi (laŭ mi la nuraj fidindaj), bonvolu klarigi al mi, ĉu la kaŭzo de tiu frakaso devenas el Marksismo-Leninismo aŭ kulpas la homoj?

Certe, mi estis konscia pri kelkaj politikeraroj de la rusaj burokratoj, la edukado de junularo, iliaj problemoj ekonomiaj kaj la disputoj inter la federaciitaj landoj. Tamen, nur post la golfa milito mi konstatis la perfidon de burokratoj rilate al mia idealo.

Kredu min, kamaradoj, mi eĉ estas seniluziigita rilate al okcidenteŭropa laboristaro.

Dum la restado en mia naskiĝlando Portugalio, mi estis konstatinta la koruptiĝon de la proletaro rilate al socialistaj idealoj. La Jankioj sukcesis korupti la tutan terglobon. Mi konstatis ke ne plu ekzistas amikeco.

Bonvolu do klarigi al mi tiun aferon!

José Marques

NDLR: Ni invitas la legantojn klarigi kaj respondi al nia kamarado tra nia gazeto. Dankon.

*****

MIA OPINIO

En junia numero de Sennaciulo estis por mi interesa artikolo de Vlad. Bespalov (Sovetia KEK) "Letero de komunisto el Sovetio". Kun ĉio mi konsentas, ĉar teruraj konsekvencoj de sovetia **Perestrojko** estas videblaj en ĉiuj postsocialismaj landoj, inkluzive de Ĉeĥoslovakio. Sed la lasta parto de la artikolo, kiu komenciĝas per vortoj "Vivu la unueco de ĉiuj laboristoj de la mondo" ktp, estas **stultaĵo**. Kiu nuntempe regas en ĉiuj politikaj partioj tutmonde? (sen diferenco ĉu laborista aŭ alia). **Intelektuloj!** Laŭ psikologoj, intelekteco estas la plej milda formo de psika perturbo. Tio signifas, ke nun neniu avangardo (komunisma aŭ alia) povas ekzisti. Mi opinias, ke maturiĝas tempo por la malpermeso de ĉiuj politikaj partioj, por ke homoj komencu lerni esti homoj. Por tiu ĉi edukado estas la plej konvena Esperanto-movado kaj Sennacieca Asocio Tutmonda.

Jozef Petera (matr. 33.860)

PRI "ORA KURTENO ANSTATAŬ LA FERA"

En la junia numero de Sennaciulo, sub la titolo "Ora kurteno anstataŭ la fera", Nikola Gudskov rimarkigas, ke la nova kurzo de rublo malhelpos sovetianojn vojaĝi eksterlanden. Pri tiu fakto li kulpigas la "senmaskiĝintan **komunistan** reĝimon de Gorbaĉov", kiu "trovis novajn perfortajn rimedojn limigi la eblecojn de siaj civitanoj viziti aliajn landojn". Li ankaŭ plendas pro la prezreformo. Ĉu li ne povas aŭ ne volas scii, ke similaj prezreformoj kaj novaj monkurzoj okazis en la tuta Orienta Eŭropo? Per multobligitaj prezoj Pollando plenigis siajn vendejojn. Ankaŭ en Ĉeĥoslovakio, Hungario, okazas la samaj fenomenoj. La salajroj siaflanke apenaŭ aŭ tute ne plialtiĝis. Same la monŝanĝa kurzo estas tute nefavora: 1 franca franko valoris ekzemple 0,80 ĉeĥoslovakaj kronoj antaŭ du jaroj kaj nun ĝi valoras 5 kronojn. Krome estas limigo de ŝanĝebla sumo. Vojaĝo al Okcidento pro tio apenaŭ eblas al normala civitano. Simpla manĝado en gastejo de Orienta Germanio kreskis por ĉeĥo aŭ slovako de 15 kronoj (5 markoj de GDR) al 204 kronoj (12 DM). Estus tamen malfacile akuzi la registarojn de Walesa/Balcerowicz kaj tiun de Havel/Klaus pro komunismo. Evidentas, ke tiu metodo estas tipe liberala, eŭfemismo per kiu oni nomas la kapitalismon. La venontaj jaroj kun la demokratie elektita rusa prezidanto konvinkigos certe multajn pri tio.

"Sennaciulo", pro la kreskanta nombro de artikoloj laŭdantaj diversajn orientajn naciismojn, pro religiemaj eĉ dekstraj vidpunktoj devus certe alinomiĝi al "Naciulo", se ĝi deziras parte konkurenci dekstrajn nacilingvajn periodaĵojn kaj ne esti iom nevole la plej grava humura gazeto de la tuta movado. Ni nur esperu, ke iam similmaniere aperos laŭdartikolo pri kanibalismo en ..... Esperantista Vegetarano.

32.593

KOMUNIKO

Por nia memoro- Ni ĵus eksciis, ke en 1938 (kaj ĉu poste ?) ekzistis revuo kiu nomiĝis "LA KRITIKA OBSERVANTO", periodaĵo de la movado "Internacia Socialista Kunbatalo". Ĝi estis redaktita ĉe: International Publishing Co., Dean House, 116, Great Titchfield Street, London WI.

Ĉu iu leganto povas sendi al la SAT-Centro informojn pri tiuj gazeto kaj movado? Aŭ, ĉu iu povas esplori? Anticipan dankon.

La PK

POSTMILITA BILANCO

Kia estas la bilanco de la Golfa milito? Kiom da mortintoj? Da vunditoj? Da translokigitaj personoj? Kiagrade la ĉirkaŭmedio suferis pro tiu "hipermilito", kiel ĝin nomas iuj en la Pentagono? En kia stato nun troviĝas la regiono?

La Golfa milito signis turnopunkton en la historio pri militkonfliktoj. "Tiu milito estos montrinta unu el la fortaj donitaĵoj de la nova planeda erao: la teknika abismo, kiu disigas la riĉajn landojn de la aliaj. Se ni konsideras la nombron de la militistaj viktimoj, la rilato inter la aliancanaj kaj irakanaj viktimoj (unu por milo) estas unika en la monda historio. Eĉ la trupoj de Herman Cortès, sturmlanĉitaj kontraŭ la granda azteka imperio en 1521, havis pli da mortintoj, fronte al la malamiko, kvankam tiu konis nek la radon, nek la feron, nek la ĉevalojn, nek la pulvon...

Surloka enketo

La ĥirurga bildo de la golfa milito estis montrita, far la armeo, sub la formo de senfina filmobendo oferita, kiel nura "nutraĵo" al la teledissendiloj. La detruo de homvivoj kaj ĉirkaŭmedio estis, plej ĝenerale, kaŝita. Fakte, ankoraŭ nun, ni ne scias multon pri la realaj konsekvencoj de tiu milito. Vole, dum la militkonflikto, la amaskomunikiloj estis forflankigitaj, muzelingitaj, blindigitaj. La realeco de tiu milito estis cenzurita. Dum gazetkonferenco, kiun ĝi donis en Vaŝingtono, la 29-an de majo, GREENPEACE transdonis ducentpaĝan raporton pri la Golfa milito. Redaktita sub la direkcio de Bill Arkin, respondeculo pri la fako "militaj traserĉoj" de GREENPEACE, tiu raporto provis starigi kompletan bilancon pri la rezultoj de tiu milito por la loĝantaro kaj ĉirkaŭmedio.

La raporto rivelas, ekzemple, ke la homaj perdoj povas esti tiele ciferitaj:

- de 151.000 ĝis 183.000 personoj, irakaj, kuvajtiaj, aliancanaj militistoj, la vivon perdis pro la milito (bilanco haltigita komence de majo).

- De 100.000 ĝis 120.000 irakaj militistoj, kaj de 5.000 ĝis 15.000 irakaj civiluloj mortis dum la milito. De 4.000 ĝis 6.000 civitanoj mortis sekve de siaj vundoj kaj pro manko da medikamentoj aŭ pro malsato, post la fino de la milito.

- De 49.000 ĝis 76.000 irakaj civiluloj mortis dum la civila milito, kiu tuj sekvis la militan konflikton. Inter ili, de 15.000 ĝis 30.000 kurdoj kaj aliaj rifuĝintoj mortis sur vojoj aŭ en tendaroj.

- Inter 100.000 kaj 120.000 irakaj militistoj, 50 % perdis la vivon dum la terbatalo, kiu daŭris 100 horojn, inter 24-a kaj 28-a de februaro, ĉefe sur la aŭtovojo de l'Infero (25.000 mortintoj) inter KOWEIT-CITY kaj la iraka landlimo, kaj dum enbataligo, kiu okazis la 1-an de marto, tagon post la militĉesigo. Iraka milittaĉmento, kiu provis transiri Eŭfraton, estis tiam neniigita. La Golfa milito estis la kaŭzo de la plej granda popolmigrado, dum la plej mallonga periodo, el la moderna historio. Pli ol 6 milionoj da personoj (irakanoj, kuvajtianoj, kurdoj) popoloj, kiuj troviĝis en urboj suferantaj pro popola milito, 2 milionoj da gastlaboristoj, loĝinstalitaj en Irako kaj Kuvajtio, havis sian vivon ruinigitan pro tiu militkonflikto.

La ĉirkaŭmedio pagas kontante

Irako kaj Kuvajtio estas, hodiaŭ, du traŭmatizitaj landoj. La iraka ekonomio estas detruita kaj la popolo, kontraŭ kiu, ni memoru "la aliancanoj ne militis!", devos iamaniere pagi la gigantajn damaĝojn, kiujn tiu militkonflikto okazigis. Pagi la krimojn de siaj estroj.

La ĉirkaŭmedio de la Golfo estis severe trafita. "La incendio de la petrolputoj povus konsistigi unu el la plej gravaj aerpoluadoj", laŭ la New-York Times. Michael Gwynne, unu el la oficialaj delegitoj de la "Programo de Unuiĝintaj Nacioj por la ĉirkaŭmedio" komparas al Ĉernobil la incendion de la ĉirkaŭ 600 kuvajtiaj petrolputoj. "Estas unika katastrofo en la mondhistorio."

En kia stato troviĝas nun la Golfoakvoj en kiuj nigraj tajdoj, volaj aŭ akcidentaj, sinsekvis? Meze de aprilo, oni taksis je 4 milionoj da bareloj, la kvanton da petrolo, kiu alfluis en la maron. La plej giganta el la nigraj tajdoj. Tiam, la petrolo daŭre defluis. En nia nuna Mondo, pli kaj pli dense loĝata, urbanizita, la dezerto aperis, kiel la plej perfekta batalkampo. La ideala loko por interbatali, lasante la civilulojn kaj la ĉirkaŭmedion ekster la konflikto. Sed, oni konstatas, ke probable neniam dum tiel mallonga milito, civiluloj kaj ĉirkaŭmedio estos pagintaj tian grandan tributon al militkonflikto.

Tradukis Etienne

Tiu tre dokumentita artikolo, verkita de André Ruwet, aperis en la franclingva revuo de GREENPEACE (junio-julio-aŭgusto 1991)

Aldono de la tradukinto: Momente, laŭ lastaj informoj, Georges BUSH kaj Sadam HUSEIN bonfartas. Dankon por ili!

Aliĝu frue al la kongreso en Kaunas.



JUBILEO DE RADIO-ESPERANTO PARIZO

La 1an de oktobro 1981 komenciĝis la elsendoj de RADIO ESPERANTO en Parizo (89,4 MHz) kadre de RADIO-LIBERTAIRE.

Ni tuj notu por la legantoj, ke oni povas aŭskulti tiun radion nur en la pariza regiono. Ĝi estas libera, sed loka radio. De dek jaroj, ĉiu-vendrede, seninterrompe, de la 18h ĝis la 19h, ĝi proponas al la aŭskultantoj: informojn, komentojn kaj intervjuojn.

Fidele (preskaŭ) ĉiuj esperantistoj el la pariza regiono aŭskultas ĝin.

En si mem dekjariĝo ne estas evento. Ĝi estas nur etapo. Sed por festumi digne tiun "ne-eventon", la 4-an de oktobro 1991 la skipo de RADIO-Esperanto decidis inviti multajn amikojn dum neordinara horaro, inter la 18-a kaj 20h30.

Pluraj invititoj ne povis veni, sed sendis mesaĝon (Grandière, SAT-Amikaro), kasedon (Texier, UFE) kaj dudek-ok venis.

Kompreneble, dum du horoj kaj duono, ĉiu povis alparoli nur dum kelkaj minutoj. Sed ne povis aliel okazi. Danke al tiu granda varieteo, ni povis aŭdi la voĉojn de membroj de ĉiu esperantista asocio (1), de multaj lokaj grupoj (Bondy, Villejuif, Choisy-le Roi, Draveil k.a.), de poetoj, de verkistoj k.t.p... kaj de simplaj esperantistoj.

Laŭaspekte ĉiuj estis kontentaj kaj deziris reveni por la dudekjariĝo !

Ni daŭre klopodos por ke RADIO-ESPERANTO (2) estu daŭre ulu el la ligiloj kaj propagandiloj de la parizregiona esperantistaro.

La skipo de RADIO-ESPERANTO

PS: Ni daŭre ne komprenas kiam (malgraŭ niaj petoj) kelkaj esperantaj revuoj obstinas ne aludi pri la vivo de RADIO-ESPERANTO?
Feliĉe kelkaj inter la plej gravaj (kiel "Heroldo de Esperanto", "Monato", "Sennaciulo") regule inkluzivas la programon de RADIO-ESPERANTO en la priradiaj artikoloj.

(1) Ni nur "forgesis" JEFO-n. Ili venos dum speciala elsendo.
(2) 145, rue Amelot, F-75011 Paris, Francio.

KOTIZTABELO POR 1992

Lando	Valuto	Helpa kotizo (1)(2)(5)	Plena kotizo (1)(2)(5)(6)	Emeritoj (1)(2)(4)(5)	Familianoj, Junuloj Senlaboruloj (1)(2)(3)(5)	Jara abono Sennaciulo (5)	Abono S. Revuo (2)
Argentinio	US$	16,00	8,00	6,00	4,00	8,00	2,00
Aŭstralio	Aŭstr.$	90,00	45,00	35,00	22,50	35,00	8,50
Aŭstrio	Ŝilingoj	930,00	465,00	360,00	235,00	360,00	85,00
Baltaj landoj	Rubloj	30,00	15,00	12,00	7,50	12,00	2,50
Belgio	Belgaj Fr.	2800,00	1400,00	1100,00	700,00	1100,00	275,00
Brazilo	US $	20,00	10,00	8,00	5,00	8,00	2,00
Britio	Pundoj	42,00	21,00	16,00	10,50	16,00	4,00
Bulgario	Levoj	80,00	40,00	30,00	20,00	30,00	10,00
Ĉeĥoslovakio	Ĉeĥaj Kr.	600,00	300,00	225,00	150,00	225,00	45,00
Ĉinio	Juanoj	40,00	20,00	15,00	10,00	20,00	5,00
Danlando	Danaj Kr.	550,00	275,00	210,00	135,00	210,00	50,00
Finnlando	Fin. Mark.	340,00	170,00	130,00	85,00	130,00	35,00
Francio	Fr.Fr.	470,00	235,00	180,00	118,00	180,00	45,00
Germanio	Ger.Mar.	144,00	72,00	56,00	36,00	56,00	14,00
Hispanio	Pesetoj	5000,00	2500,00	1875,00	1250,00	1875,00	465,00
Hungario	Forintoj	800,00	400,00	300,00	200,00	300,00	75,00
Italio	Ital.Liroj	88000,00	44000,00	34000,00	22000,00	34000,00	8500,00
Izraelio	N. Sikloj	130,00	65,00	50,00	33,00	50,00	12,50
Japanio	Enoj	12200,00	6100,00	4600,00	3050,00	4600,00	1200,00
Jugoslavio	Dinaroj	300,00	150,00	115,00	75,00	115,00	30,00
Kanado	Kan. $	90,00	45,00	35,00	22,50	35,00	8,50
Nederlando	Guldenoj	144,00	72,00	56,00	36,00	56,00	14,00
Norvegio	Norv.Kr.	540,00	270,00	200,00	135,00	200,00	50,00
Novzelando	Novz. $	90,00	45,00	35,00	22,50	35,00	8,50
Pollando	Zlotoj	100000,00	50000,00	37500,00	25000,00	37500,00	9500,00
Portugalio	Eskudoj	3400,00	1700,00	1300,00	850,00	1300,00	325,00
Sovetio	Rubloj	30,00	15,00	12,00	7,50	12,00	2,50
Svedio	Sved. Kr.	520,00	260,00	200,00	130,00	200,00	50,00
Svislando	Svis.Fr.	140,00	70,00	54,00	35,00	54,00	13,50
Usono	US $	84,00	42,00	32,00	21,00	32,00	8,00

Landoj ne ĉi supre menciitaj petu de la SAT-Centro.
(1) - La servo de la asocia organo "Sennaciulo" estas entenata en la kotizo (escepte por familianoj)
(2) - La abono al Sennacieca Revuo, ne entenata en la kotizo, estas aparte pagenda.
(3) - Membroj ĝis aĝo de 25 jaroj estas konsiderataj kiel "Junuloj".
(4) - Emeritoj pagas reduktitan kotizon, **kiam iliaj enspezoj estas malaltaj kaj ne ebligas al ili pagi plenan kotizon.**
(5) - Por ekstereŭropaj membroj/abonantoj, la kostoj de aerpoŝta sendado de nia organo Sennaciulo estas entenata en la kotiz/abon-tarifoj.
(6) - Aliĝantaj grupoj pagas duoblan kotizon kaj ricevas du gazetojn.

ADRESOJ DE PERANTOJ

Argentinio: Rodolfo Calogero, Namuncura 1749, Casilla de Correo 435, RA-8300 Neuquen.
Aŭstralio: Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, NSW 2041
Aŭstrio: Dr. klaus Karner, Schützenstr. 44e, A-6020 Innsbruck (poŝtkonto 3799.466 (Oester. postsparkasse, Wien, konto 000-0025223-03)
Baltaj landoj (Estonio, Latvio, Litovio): Viktoras Baniulaitis, ab.d.168, 235800 Klaipeda, Litovio
Belgio: Clémentine Staquet, Rue du Loutrier 14, B-1170 Bruxelles, poŝtkonto 001-0412103-26.
Brazilio: G.R.Ledon, Rua Maria Aparecida Anacleto 111, BR-04809 Sao Paulo-SP.
Britio: E.S. Wojtas, 1160 Stockport Rd., Manchester, M19 2TJ,
Bulgario: Ganĉo Damjanov, Makariopolski 7, BG-6100 Kazanlak
Ĉeĥoslovakio: Miro Zavodsky, Ĉsl. brigady 67, CS-01004 Zilina-Zavodie.
Ĉinio: Ding Yanqing, Yangsi-Yousuo, CN-242044 Xuanzhou, Anhui.
Danio: Ulrik Rasmussen, Nörregärdsvej 66, DK-2610 Rödovre.
Finnlando: Esa Lang, Lokinkatu 5, SF-15610 Lahti, poŝtkonto n° KO 462985-6.
Francio: Pierre Quillaud, 16 rue du Lt. Vaisseau Paris, F-76120 Le Grand Quevilly, poŝtkonto n° 1.906.23 C, Rouen.
Germanio: A.F.Stephan, Carmenstr. 5, D-4000 Düsseldorf 11, poŝtkonto 284399-438 PGA-Essen.
Hispanio: R. Manau Torres, Montseny 5 piso, E-08208 Sabadell, konto: Caixa de Pensions, Oficina 461, Lta.171-29 Sabadell.
Hungario: Béla Kovacs, Béla kiraly u. 44., H-7400 Kaposvar.
Italio: Vittorio Malaroda, Via S. Polo 115, I-34074 Monfalcone, Gorizia, konto:C/C 1074/20 Cassa di Risparmio di Gorizia, fil. de Monfalcone.
Izraelio: Jehoŝua Tilleman, 40 Ŝivtej-Jisrael-Str., IL-26275 Kirjat-Ĥajim.
Japanio: Hiroyuki Tani, Syonai-Higasimati 3-4-6, J-561 Toyonaka-si. Poŝtkonto: Oosaka 8-37624, SAT-Nihon.
Jugoslavio: Ivan Moĉilnik, Pozeŝka 132, YU-11030 Beograd.
Kanado: Eduardo Vivancos, 218 Withrow Ave.,Toronto, M4K 1E1.
Nederlando: J.v.Hulst, Leidsevaart 238, NL-2014 HE Haarlem, poŝtkonto: 2853752.
Norvegio: Per Engen, Söre Bellevuevej 8, N-5019 Bergen.
Novzelando: Brian Fox, 634 South Titirangi Road, Titirangi, Auckland 7,
Pollando: Elzbieta Janusz, ul. Krowoderska 74/3, PL-31-158 Krakow.
Portugalio: A.P. Da Silva, Rua Antonio Ferreira,9-3°esq,P-1700 Lisbono.
Sovetio: L. Vulfoviĉ, Polehskaja 147-I-40, SU-127347 Moskva, pago al: ФСБ 5278/01134 pёс 164709 в МГБ Сбербанка РСФСР код ВА МФО 201906 счет 11549 Вульфович Лев
Svedio: Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29 I, S-171 44 Solna, poŝtkonto 26-63-22-7.
Svisio:Erna Döring, Poŝtfako 225, CH-4003 Basel, poŝtkonto n° 40-43136-2.
Usono: Doug Witscher, P.O. Box 536, Urbana, IL-61801
Aliaj landoj: Adreso de SAT-sidejo, poŝtkonto: 1234-22 K, Paris.

S. A.T. erinaco



DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ

EL SOVETIA CIRKO



SOVETIA CIRKO: La cirkestro, la leono kaj la dresisto.



ADIAŬO DE MARKS KAJ LENIN: - Ĝis neniam, kamaradoj !
El "TUTMONDE"

HUMURO

LOGIKO

Du viroj renkontiĝas:
- Saluton, sekreta policano!
- Ha! Kiel vi rekonis min?
- Estas logike, ĉar en Bulgario ĉiu dua homo estas sekreta policano, kaj mi ne estas, do tiam vi estas!

*****

OPINIO

Altaj partiaj funkciuloj demandas iun ordinaran partianon:
- Kion vi pensas pri Usono?
- Samon kiel pensas la partio kaj la registaro.
- Via opinio pri situacio en Pollando?
- Sama kiel tiu de partio kaj de registaro.

Tiel li respondis al ĉiuj demandoj. Tiam indignitaj, ili fine demandas lin:
- Ĉu vi ne havas vian propran opinion?
- Jes mi havas, sed mi preferas ne doni ĝin.

*****

PROPAGANDO

En centro de Sofio iu viro disĵetas multajn flugfoliojn. Aperas milicano kaj demandas al la viro:
- Kion vi faras?
- Mi disĵetas la propagandilojn.

La milicano arestas lin kaj kunportas amason da flugfolioj. Rigardante ilin, li diras:
- Sed, sur la flugfolioj nenio estas skribita!
- Kompreneble, ĉar ĉio estas klara!

Ŝercoj el Bulgario

Sendu kontribuaĵojn al "SAT-Erinaco"!

Desegnu mem aŭ eltranĉu el viaj gazetoj